**SOVETLANDA ESPERANTISTA UNUIĜO.**
**Союз Эсперантистов Советских Стран.**

**CENTRA KOMITATO**
Moskvo, Poŝtkesto, 630.

**ЦЕНТРАЛЬНЫЙ КОМИТЕТ**
Москва, Почтовый ящик 630.

Proletarioj de la mondo, unuiĝu vin!
Пролетарии всех стран, соединяйтесь!

5-IV 1926 г.

№

R. 16. IV. 1926

Estimata Sinjoro!

Danke mi kvitancas ricevon de la leteroj de 24-XI. & 24-III.

Troa okupiteco — malhelpas al mi — ĝis nun de- tempo, kiom mi volus — por la korespondado internacilingva.

Antaŭ kelkaj tagoj mi sendis al vi 4 ekz. de „La Serĉado de la lingvo universala". Estis la lastaj ekzempleroj. Libro estas disvendita. Kiam aperos nova eldono — mi ne povas antaŭvidi.

Volu akcepti kiujn librojn kiel mian pagon por „Academia pro Interlingua", kvankam antaŭ semajno al s-ro Wahl mi skribis petante lin, ke li reguligu mian ŝuldon al vi. Por ĉiuj literaturaĵoj en interlingvoj aŭ aliaj lingvoj, kiujn vi sendos al mi — mi estos tre danka.

La elspezojn mi pagos per mia agento en Leipzig.

Mi estos dankema, se vi publikigus recenzon pri mia libro en via gazeto.

Serioze dirante mi pensas, ke mia libro — kun kelkaj ŝanĝoj povus esti tre bone eldonata en aliaj lingvoj eŭropaj: simila verko — ja tute mankas.

/Ern. Drezen/

Bedaŭrinde mia ĉefokupiteco malhelpas al mi serioze okupiĝi pri tiu afero. La sama okupiteco estas kaŭzo, ke mi skribas en Esperanto. Internacilingvaj formoj estas por mi pli malfacilaj. Mi devas pli multe pensi ilin skribante.

Kio koncernas — la varbadon de membroj de API en Sovetio — mi pensas, ke tiaj klopodoj estas vanaj.

Fakte la tuta internacilingva movado kaj movado pure praktika estas Esperanto.

Plejmulto el sovetlandaj esperantistoj interesas praktika apliko, sed ne teoriaj diskutoj.

Mi persone — estas iom ali kazo. Jam antaŭ 14-15 jaroj (ankoraŭ gimnaziano) mi jam skribis al vi kaj konatiĝis kun la vasta mondlingva kampo.

Atendante viajn afablajn informojn.

Kun saluto

Via E. Drezen.

Moskvo.
Armjanskij 1. kv. 23.